



saluton!

ktp!

*Gemela Numero*

januaro/aprilo 1996



## De la redaktoro



### Trans-Atlantikan Saluton!

Jes, veras la onidiroj: USEJ kaj JEB kunlaboris por krei tiun ĉi belan ĝemelan numeron — de *KT!* kaj de *Saluton!* samtempe. Ni esperas, ke vi trovos interese ĝin legi.

La enhavo de la gazeto ja estas tre internacia: ni prezentas al vi multajn novaĵojn, artikolojn, rakontojn kaj opiniojn de homoj tra la tuta mondo. [Mi devus klarigi, ke pri la opinioj respondecas mem la aŭtoroj!]

En estas raporto pri lastatempa Junulara Esperantista Semajnfino en Filadelfio... invito al baldaŭa Kultura Esperanto-Festivalo en Kopenhago... rakonteto verkita de JEBano... alia verkita de USEJ-membro... paĝo pri la malsamaj slangaĵoj en Usono kaj Britio... kaj eĉ propagand-helpa arego da citaĵoj fare de eŭroparlamentanoj kiuj subtenas Esperanton.

Kaj preskaŭ ĉiom de la gazeto estas en la universala lingvo, kiel taŭgegas por tiom internacia enhavo!

Post la nuna numero, USEJ daŭrigos eldoni *ktp!* kaj JEB daŭrigos eldoni *Saluton!* Vi tenas enmane apartan numeron; mi dirus eĉ 'epokfaran', sed mi ne emas tiom sentimentalaci...

Agrablan legadon deziras al vi

Sajmĉjo (zarbi@gazebo.win-uk.net)

## Junularo Esperantista Brita (Jeb)

estas la brita organizaĵo por parolantoj, lernantoj, komencantoj, aktivuloj kaj subtenantoj de Esperanto — ĝis 30-jaraj. Post tiu aĝo oni povas daŭre help al JEB kaj la internacia lingvo, farante sin Patrona Membro.

JEB estas la junulara sekcio de Esperanto-Asocio de Britio, per kies oficejo ĝi estas kontaktebla:

- paper-poŝte: JEB, Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF
- telefone: +44 171 727 7821

## La Usona Esperantista Junularo,

fondita en 1992, estas la nacia organizo por junuloj tra Usono ĝis 27-jaraĝaj kiuj interesiĝas lerni kaj uzi Esperanton. USEJ mem ofertas al membroj i.a. jarabonon de *ktp!* (dulingva novaĵletero, kiu aperas sesfoje jare) kaj diversajn regionajn kaj naciajn junularajn renkontiĝojn.

Aldone, ĉar USEJ estas la junulara sekcio de la nacia Esperanto-organizo, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, USEJ-membroj estas samtempe membroj de ELNA kaj sekve aŭtomate rajtas ĝui ankaŭ la servojn de ELNA, kiuj inkluzivas jarabonon al *Esperanto USA*, la Nacian Kongreson de Esperanto ĉiun someron, kaj rabaton ĉe la Libroservo.

USEJ kontakteblas per:

- paper-poŝto: USEJ, 3600 Data Drive, #591, Rancho Cordova, CA 95670, USA/Usono
- e-poŝto: usej@webcom.com
- Tut-Tera Teksaĵo:  
<http://www.webcom.com/usej>

# Jen via ŝanco akiri la duan volumon de... VINILKOSMO-KOMPIL'!


Kiam ĝi aperos, en aprilo aŭ majo 1996, la dua volumo de la Vinilkosmo-kompilaĵo koston FRF 120 por KD aŭ FRF 70 por kasedo — t.e. ĉ. GBP 16,10 aŭ £9.40 — plus GBP 3 da sendokostoj. Sed mendante ĝin antaŭe vi povas ŝpari monon.

La dua volumo enhavas muzikon en Esperanto de Emily Barlaston, Piĉismo, Freemagnizhou, Micke Englund de Amplifiki, Martin de Persone, JoMo de La Rozmariaj Beboj, Milan Doĉekal de TEAM', ktp, ktp.


Se vi ne emas je komplikaj internaciaj transpagoj, vi povas uzi la servojn de brita peranto.

Unuopa ekzemplero de la KD, sendota al adreso en Eŭropo, koston GBP 13 plus GBP 3 da sendokostoj, do sume GBP 16; la kasedo koston GBP 8.60 plus GBP 3 da sendokostoj, do GBP 11.60. Sendu ĉekon pagendan al Edmund GRIMLEY EVANS kun via mendo al: Edmund GRIMLEY EVANS, St John's College, Cambridge, CB2 1TP.

(Ekzistas rabatoj por mendoj de pluraj ekzempleroj; petu detalojn.)



Mi estas peranto ankaŭ por abonon al *Rok-Gazet'*.



Now's your chance to get the second volume of...  
VINILKOSMO-KOMPIL'!

Once it's released in April or May 1996 the second *Vinilkosmo* compilation album will cost 120 French francs on CD or 70 francs on cassette — i.e. about £16.10 or £9.40 — plus £3 postage and packing. However, you can save money by ordering it in advance.

Volume 2 includes music in Esperanto by Emily Barlaston, Piĉismo, Freemagnizhou, Micke Englund from Amplifiki, Martin from Persone, JoMo from Les Rosemary's Babies, Milan Doĉekal from TEAM', and much more.

You can avoid the complications of sending money abroad by paying through an agent in Britain.

A single copy of the CD, sent to an address in Europe, costs £13 plus £3 postage and packing, total £16; the cassette costs £8.60 plus £3 postage and packing, total £11.60. Send a cheque payable to Edmund Grimley Evans with your order to: Edmund Grimley Evans, St John's College, Cambridge, CB2 1TP.

(There are further price reductions for multiple orders; ask for details.)

I also handle subscriptions to *Rok-Gazet'*.

## Kreditkartoj ĉe Esperantuja librovendejo



Uzi la servojn de 'eksterlandaj' libroservoj ofte ne montriĝas tiel facila kiel oni deziras pro transpagaj problemoj kaj la tro altaj bankokostoj. En la ĉiutaga komercadtilato ĉiam pli vaste oni uzas kreditkartojn. La tre konata Esperanto eldonejo kaj Librovendejo KARILJONO (Doornstraat 22, BE-2610 WILRIJK, Belgio; telefono k fakte: +32 3 827 24 05; e-poŝte: Esperanto-kariljono@msn.com ) rompis la vicon, kaj akceptas plurajn kreditkartojn: Visa, Eurocard, Master-card, Diners Club, American Express kaj Access.

Por la posedantoj de tiuj kreditkartoj, ne plu ekzistas transpagaj problemoj ankaŭ en Esperantujo. Ja ktp! / saluton!


KARILJONO estas unu el la plej grandaj Esperantaj librovendejoj, kie oni povas mendi librojn, video- kaj sonkasedojn, diskojn, revuojn, ktp. Posedantoj de tiuj kreditkartoj simple sciigu per subskribita karto aŭ fakso ties numeron, validodaton kaj la nomon de la kreditkarto.

Ekde la komenco KARILJONO provis havi malaltajn prezojn kaj tio ankoraŭ hodiaŭ validas. Se vi ne kredas nin, vi povas kompari kun aliaj esperantaj libroservoj kaj vi vidas ke ni pravus! Mendu nun nian novan katalogon de KARILJONO. Ĝi koston nur 300 belgajn frankojn.

# Novaĵoj de la Usona Esperantista Junularo

## USEJ decidas peti denove IJK-n

Dum la USEJ-Estrarkunsido en Philadelphia, la Estraro konsentis denove peti la IJK-n por Usono, preferinde en jaro 2000. Post longa diskuto pri variaj urboj, ĝi decidis, ke Washington DC estos la plej konvena urbo. Nun ĝi esploras la plej taŭgan universitaton en tiu urbo por gastigi la IJK-n.



## Planoj por venonta JES komenciĝas

Pro la deziro okazigi la IJK-n en Washington DC, estis decidite, ke ankaŭ la venonta JES okazu en tiu urbo, por doni al la ĉeestantoj okazon mem vidi la kongresurbon kaj diskuti pri la planado. Kelkaj el la pli gravaj konsiloj estas longigi la semajnfinojn por ke ĝi komencu ĵaudon kaj okazigi ĝin en malfrua majo, kiam plejparte de la usonaj universitataj klasoj finiĝos.

## Intereso pri 2a NAJT renaskiĝas

Post la neatendita sukceso de JES, la partoprenantoj esprimis deziron renkontiĝi tre baldaŭ ĉe alia junulara renkontiĝo kiel la Norda Amerika Junulara Tendumado. Jam komencis la kunlaborado kun la kebekia kaj kanada junuloj por iel organizi tiun renkontiĝon antaŭ aŭgusto.

## Unua T-ĉemiza desegnojam elpensita!

Niajn dankojn al Christopher ZERVIC (Illinois), kiu antaŭnelonge fariĝis la unua membro sciigi nin pri desegno por la USEJa T-ĉemizo; espereble ni baldaŭ povos pritrakti la tutan aferon.

## Ekfunkcias nova paĝo de USEJ membro en la Tut-Tera Teksaĵo

Multege da niaj membroj preparas jam personajn TTT-paĝojn (kelkaj el kiuj ja multe mencias Esperanton kaj USEJ-n!). En la plej novaj estas tiu de Benjamin STEVENS (Pennsylvania) ĉe:

<http://www.geocities.com/Athens/3955/>

index.html



kvankam, kiel dirite, ja ekzistas multaj aliaj tre vidindaj paĝoj. Sciigu nin ankaŭ pri via TTT-paĝo, por ke aliaj Esperantistoj povu vidi ĝin!

## Membro donacas al grupo en Kubo

Post tre longa kaj memorinda vojaĝo tra Kubo, Brian KRUEGER (Washington) sendis 60 fotokopiojn de Esperanto-lernolibro al loka grupo en Kubo. Li sciigas nin, ke ni ne forgesu ankaŭ la lokajn Esperantajn klubojn en la pli malgrandaj urboj kaj lokoj!

## Okcidenta renkontiĝonuligita pro vetero

Pro la sufiĉe aĉa vetero en la okcidenta Usono, Sybil HARLOW (California) malfeliĉe devis nuligi intertempe la okcidentan junularan renkontiĝon, planitan por la 8a ĝis la 10a de marto en Lake Tahoe. Tamen, ŝi jam klopodas reokazigi ĝin baldaŭ.

## Mondpremiero de Esperantista muziko en Baltimore

Iom da novaĵoj pri tre grava USEJ-a subtenanto, komponisto David GAINES (Maryland), kies muzika verko baldaŭ 'premieros' la 17an de aprilo en Baltimore. Bonŝancon!

## Vitame vas v Americe!

Salutojn kaj bonvenon al alia USEJ-a subtenanto/on-to, Lucie KAREŠOVA, la longtempa Esperanta aktivulo i.a. por la ĉeĥa junularo kaj TEJO, kiu studos kaj labo-



ros 18 monatojn en Bostono je subvencio. Gratulon! Ŝi jam esperas je multaj okazoj fine ĝui la Esperantan vivon nun en ĉi tiu flanko de l' Atlantiko.

## Bedaŭroj pro mankantaj USEJ-delegitoj

Ellen EDDY (sekretario de ELNA) kaj Vilĉjo MAXEY ambaŭ bedaŭris, ke USEJ-delegito mankis por la 2a Pan-Amerika Esperanta Kongreso, kiu okazis en februaro en San Jose, Kostariko. Kvankam la Kongreso pritraktis multajn aferojn, ĝi ne povis diskuti multe pri junularaj aferoj ĉar venis raporto nur de la junularo de Brazilo. Ili esperis, ke venos almenaŭ kelkaj junularoj por la venonta Pan-Amerika Kongreso, kiu okazos en Bogota, Kolumbio, en 1999.

## La tri viroj


En la vilaĝo Kuŝ estis multaj bestoj. Estis multaj anasoj, kaj multaj porkoj kaj multaj bovinoj. La vilaĝanoj manĝis ovojn de la anasoj, porkaĵon de la porkoj, kaj trinkis lakton de la bovinoj. La tuta vilaĝanaro estis gaja.

Unu tagon tri viroj vizitis la vilaĝon. Unu muzikis per ŝalmo, unu kantis, kaj unu dancis. Ili plaĉis al la vilaĝanoj.

Sed la sekvantan tagon la infanoj ne povis vidi la anasojn. Ili iris al la virinoj kaj petis: "Kie estas la anasoj?" La virinoj serĉis sed ili ne povis vidi la anasojn. Ili iris al la viroj, kaj petis: "Kie estas la anasoj?" La viroj serĉis, sed ili ne povis vidi la anasojn. Ili estis tre malgajaj, ĉar ili ne plu povis manĝi la ovojn de la anasoj.

Je la posttagmezo la tri viroj revenis. Unu muzikis per ŝalmo, unu kantis, kaj unu dancis. Ili plaĉis al la vilaĝanoj, kaj tiam la vilaĝanoj ne estis malgajaj. La sekvantan matenon la infanoj ne povis vidi la porkojn. Ili iris al la virinoj, kaj petis: "Kie estas la porkoj?" La virinoj serĉis sed ili ne povis vidi la porkojn. Ili iris al la viroj, kaj petis: "Kie estas la porkoj?" La viroj serĉis, sed ili ne povis vidi la porkojn. La tuta vilaĝanaro estis malgaja.

Je la posttagmezo la tri viroj revenis. Unu muzikis per ŝalmo, unu kantis, kaj unu dancis, sed ili ne plu plaĉis al la vilaĝanoj. La vilaĝanoj estis malsataj.



Tiun nokton, unu infano diris: "Mi volas gardi la bovinojn. Mi volas vidi la ŝteliston." "Ankaŭ ni," diris la aliaj infanoj, kaj ili iris al la bovinejo.

La ŝtelistoj iris en la bovinejon kaj ŝtelis la bovinojn. La infanoj silente sekvis la ŝtelistojn en la arbaron. En la arbaro estis fojnejo kaj kabano, kaj en la kabano estis multaj anasoj, multaj porkoj kaj multaj bovinoj.

Du infanoj rapide kuris en la vilaĝon kaj ekkriis "Venu! Venu! La ŝtelistoj estas en la arbaro! Sekvu nin!"

La viroj kaj virinoj rapide kuris en la arbaron, kaj vidis la ŝtelistojn. Ili estis la tri viroj.

La ŝtelistoj eskapis, sed la vilaĝanoj ne estis malgajaj, ĉar la infanoj estis trovintaj la bestojn en la kabano. La bestoj revenis kun la vilaĝanoj al la vilaĝo Kuŝ. La vilaĝanoj denove estis gajaj kaj ne plu malsataj.

FINO

Rakonto de Joanne SINCLAIR

# Kultura Esperanto-Festivalo: Letero de la aranĝantoj

Jena letero de la KEF-grupo invitas artistojn sin mem kaj sian prezentaĵon kaj ordinaruloj proponi artisto(j)n aŭ/kaj ideo(j)n por la festivalo.

La preparoj por la venonta Kultura Esperanto-Festivalo jam komenciĝis, kaj sendube ĝi estos almenaŭ tiom bonega kiom la kvara. Ĝi okazos de la 6a ĝis la 11a de aŭgusto 1996, kiam Kopenhago estos la kultururbo. Do, jam nun notu la daton en vian kalendaron. Tiuj, kiuj jam partoprenis en KEF, scias, ke estos neforgeseblaj tagoj, plenaj je diversaj eroj de la internacia, diaspora kulturo, plenaj je bonhumoraj Esperanto-parolantoj el multaj landoj, plenaj je spertoj, plenaj je eksterordinara etoso.

Kiel nova inventaĵo estos la eblo por aktiva festivalumado, la eblo por esti kreema, ĉar kulturo ne nur estas io, kiun kreas pli-malpli frenezaj homoj, kaj kiun ni, la ordinaraj, la mense sanaj, rigardas en muzeoj, spektas en teatro aŭ aŭskultas en koncerto. Je la nuna stato tio signifas, ke ni planas rezult-celajn laborgrupojn, ekzemple korusa(j)n verko(j)n kaj permane farota(j)n artaĵo(j)n, sed se ekestos en aktivaj cerboj dise en la mondo aliaj ideoj, ne hezitu proponi tiujn. Cetere ankaŭ ideoj, en kiuj la procezo ludas la ĉefan rolon, estas bonvenaj.

La KEF-aranĝantoj tial serĉas kontaktojn kun ĉiaj artistoj, ĉu muzikistoj, pentristoj, komponistoj, verkistoj, komediintoj, skulpturistoj aŭ aliaj, kiuj pretas aktivi/aktori dum la festivalo. Ne forgesu, ke akcepteblas nur originale Esperantaj verkaĵoj, kaj kion povos vi, vi la artisto, prezenti? Ankaŭ proponoj de/pri ekstereŭropaj artistoj bonvenas. Bonvolu sciigi nin, ĉu vi pretas (parte) gvidi la aktivigon de la partoprenantaro.

1996 ne nur estas KEFa jaro. Ĝi ankaŭ estas jubilea jaro, kiun Esperantujo iel devus marki. Temas kompreneble pri la Esperanta teatro, kies unua prezentaĵo okazis ĝuste antaŭ 100 jaroj en la urbo Smolensk, Pollando. Estis verko de la rusa nobelulo Tolstoj, kiuj estis tre favora al la internacia lingvo. Pripensu tion!

Se vi tute ne emas aktivigi kulture, vi tamen notu la daton, ĉar kompreneble eblos flegi la pli pasivan partoprenon. Laŭsperte ne ĉiuj opinias tiun aktivigon kulture, tiun mem-torturadon, homa, kaj ankaŭ por tiuj hedonismuloj estu loko.

Amike salutas la KEF-aranĝantoj.  
Kultura Esperanto-Festivalo Sekretariejo  
p/a Jac NORDFALK  
Rådmandsgade 53, 2. th.2200 Kopenhago N  
telefone: +45 31 83 82 20 e-poŝte: nordfalk@fys.ku.dk

---

---

## Can USEJ help you learn more about Esperanto's culture?

USEJ offers a library of magazines from around the world, the USEJ Biblioteko, for our members to use. Write to Joseph Truong, 624 Second St., Lancaster, PA 17603-5114, or via email at [jtruong@loyola.edu](mailto:jtruong@loyola.edu) for a copy of the catalog and lending rules. More info on this service in our next issue.

USEJ also supports the "World of Esperanto Online," a beginner's reference to the Esperanto sites around the world. You can visit it at: <http://www.webcom.com/usej/world/world.html>.

And now we have a mailing list for youth-oriented topics in and about Esperanto. You can join via our main web page <http://www.webcom.com/usej/usejdisk.html> or by writing us at [usej@webcom.com](mailto:usej@webcom.com)

# Vidpunkto: Mistifika revado pri la estonteco de Esperanto

## Minimuma kriza maso de la Esperantistaro

Stefan MACGILL, antaŭa prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) publikigis en ties organo, *Internacia Pedagogia Revuo* (4/1991, p. 1-7), la fantaziajn rezultojn de sia ĵonglado per ciferoj por provi montri, kiom da Esperantistoj estas en la mondo, kaj kie ili troviĝas. Lia celo estis ekscii la minimuman krizan mason, t.e. la minimuman nombron da Esperantistoj por certigi, ke la Esperanta parolkomunumo estu ekster minaco de malapero.

La cifero, kiun li ĉerpis en la aero, estas 1 000 000. Li konjektis, ke ur unu generacio de neglekto sufiĉas porti la lingvon en vivdanĝeran staton. Pro tio estas bezonataj konstantaj programoj de informado, instruado kaj aplikado de Esperanto en ĉiu generacio. Tamen, tiaj kreskigaj agadoj ne ĉiam per si rezultigas kreskon; multfoje ili sufiĉas nur por konservi la ekzistan, stagnan nivelon aŭ por malhelpi regreson. Riskoj por la pluekzisto de la Esperanta parolkomunumo estas mortoj de membroj kaj kabeado.


MACGILL supozis, ke varbado de 40 000 novaj Esperantistoj ĉiujare estas necesa, sed por informi akiri tiun nombron, oni devas instrui la lingvon al 200 000 personoj, kaj por informi pri la lingvo, multe pli granda grupo — 800 000 personoj — estas bezonata. Cetere, ne estas neglektenda samtempa altigo de la lingva nivelo de ekzistantaj parolantoj de Esperanto. MACGILL daŭrigis sian aritmetikan akrobataĵon per la supozo, ke maksimuma kriza maso de uzantoj de la lingvo por ebligi al Esperanto sendependan ekziston kun kapablo de regenerado sen konstanta interveno de movadaj funkciuloj, estas inter 30 kaj 50 milionoj. Nun ne nur la ciferoj sed ankaŭ MACGILL ŝvebas en la aero.

## Kiuj instruos?

Tiuj taksoj de MACGILL estas tute teoriaj, tre malproksimaj de la ekzistanta situacio en Esperantujo. La reala bildo montras kontraŭan tendencon. Du jaroj da enketado fare de ILEI malkovris nur ĉirkaŭ 10 000 lernantojn, al kiuj MACGILL kaprice kaj arbitre aldonis ankoraŭ 40 000 en la landoj, kiuj ne resendis respondojn. Tiel li akiris 50 000 lernantojn — nur kvaronon de la taksita bezono!

Plialtigo de tiu nombro estas la tasko de instruantoj kaj instruistoj de Esperanto, sed estas ja evidente, ke ne estas sufiĉe da ili por instrui Esperanton je la komenca nivelo al 200 000 personoj. Tri jarojn post aperigo de tiu grandioza plano, evidenti, ke ILEI ne sukcesis organizi kursojn por trejni la kvanton da instruantoj de Esperanto, kiu siavice instruos la lingvon al eĉ malgranda proporcio de la 200 000 bezonataj lernantoj, el inter kiuj devos veni ĉiujare la 40 000 novaj Esperantistoj por garantii stabilecon kaj pluekziston de la parolkomunumo.

Grava demando, kiun MACGILL ne tuŝis en sia artikolo, temas pri la tempodaŭro bezonata por instrui Esperanton al homo, por ke li povu uzi ĝin por ĉiuj bezonoj de la vivo, alivorte, por paroli sufiĉe flue kaj tiel fariĝi aktiva membro de la Esperanta parolkomunumo. Se temas pri instruado de centmiloj da lernantoj ĉiujare, la demando ne estas respondebla. Ankoraŭ unu tikla demando estas: kiom da instruantoj de tiu amaso mem posedas la lingvon je kompetenta grado?



## Malgrandiĝo de la proporcio de Esperantistoj en la mondo

Dum MACGILL sidas en sia kabineto kaj mistifikas per ciferoj, la nombro da Esperantistoj en la mondo ne pli-grandiĝas. Sociologiaj enketoj pri membroj de Esperanto-asocioj en Ĉeĥoslovakio kaj Hungario en la 1980-aj jaroj malkovris, ke ĉiujare tiom da homoj forlasas la landajn asociojn, kiom aliĝas en la sama periodo. kaj malantaŭ la dorso de MACGILL disvolviĝas fenomeno, kiu aŭguras eĉ pli grandan malbonon por la Esperantistaro.

Pro la senhalta reproduktiĝo de la tuta loĝantaro sur la tero, la *proporcio* de Esperantistoj malaltiĝas. Ekzemple, en 1927 estis 16 membroj de UEA inter unu miliono da homoj: en 1986 en ĉiu miliono estis nur 9! Esperantistoj fine malaperos aŭ almenaŭ fariĝos malfacile troveblaj kiel formikoj en sablomonto.


Vidpunkto de Bernard GOLDEN  
el *Le Travailleur Esperantiste*

Statistikoj prognozas, ke aziaj popoloj kiel la ĉinoj kaj hindoj, kiuj nombris 882 kaj 363 milionoj en 1992, atingos 1 100 kaj 400 milionojn respektive en la jaro 2 000. La plejmulto de tiuj homoj tute ne bezonas Esperanton. Ili simple generas pli kaj pli da beboj, kiuj parolas en la propra lingvo. Antaŭ tiu daŭre kreskanta homamaso la Esperanto-movado estas senhelpa. La lingvoj de tiaj popoloj ekspansias multe pli rapide ol la kreo de la maksimuma kriza maso de Esperantistoj.

Trompaj estas troigitaj raportoj venantaj de kelkaj partoj de la mondo pri intensiĝanta intereso rilate Esperanton kaj amasa partoprenado en kursoj. Same kiel en pluraj pasintaj jardekoj, tiaj eventoj estas tre efemeraj kaj ne lasas spurojn pli daŭremajn ol la nombroj de la migrantaj verdaj misiistoj, kiuj okupiĝis pri instruado kaj varbado.

La tuta skemo elcerbigita de MACGILL estas pura revado, kies manko de reala substanco devas esti evidenta al ĉiu sobre pensanta homo.

## A special BENNEM postcard ...





# 2a JES: Duonigo de partoprenantoj, duobligo de amuzo



## Filadelfio.

Jam la unua tago de la renkontiĝo prezentis surprizan frenezaĵon — kelkajn centimetrojn da neĝo! Malgraŭ tio, tre fervora, babilema kaj sufiĉe freneza grupo mem da junuloj kuraĝe vojaĝis al monaĥinejo en norda Filadelfio (Philadelphia) por ĉeesti la 2an Junularan Esperantistan Semajnfinojn, organizitan de la Usona Esperantista Junularo de la 8a ĝis la 10a de marto 1996.

La nombro da partoprenantoj de la 2a JES estis iom malpli ol duono de tiu de la 22-kapa JES pasintjare, sed ĉio cetera ja multe kreskis ekde 1995 — la lingvoscio de la partoprenantoj (aparte laŭdinda nivelo de Esperanto, kaj eĉ neniom da krokodilado), la kvalito de la konferencoj mem (monaĥinejo kiu ofertis unuopajn ĉambrojn, multege (eĉ tro??) da bonegaj mangaĵoj, kaj pli ol sufiĉe da kunvenspaco), kaj, laŭ la diraĵoj de la partoprenantoj, la amuzo kaj la intereso de la unika sperto.

La frenezeco daŭris la tutan semajnfinojn, danke al kelkaj sufiĉe strangaj ludoj, kiel la balona rompadado (en kiu ĉiu partoprenanto pendigis sur la dorso balonon kaj ricevis batilon el ĉiujn ĵurnalpaperojn). Tiam ĉiu kuris kaj klopodis frapadi la balonojn sur la aliaj personoj. Mi neniam imagis, ke ni Esperantistoj povus esti tiel

perfortemaj, ĉar mia korpo ankoraŭ multe doloras), ronda tabloteniso (ĉu eblas ludi tablotenison dum kuri ĉirkaŭ la tablo?) kaj eĉ flugpilkado per balonoj — en la kunvenĉambro mem (unu el la balonoj eĉ enhavis iom da akvo... kaj rompiĝis sur min kiam mi frapis ĝin.)

Estis ankaŭ iom da tempo por seriozaj diskutoj, ekzemple tiu pri kiel ni junaj Esperantistoj povas plibonigi la mondon. Ni povis kompili sufiĉe interesan, malgrandan liston da ideoj, kiu ja helpas USEJ en ĝia socia agado. Unu partoprenanto eĉ faris mallongan liston de kvar tre gravaj kaj pensigaj ideoj pri Esperanto kaj socia agado. (Persone, inter la plej memoraj por mi estis, ke “Esperanto estas ilo, ne celo”.) La listo, kun aliaj interesaj faktoj pri la volontado, haveblas senpage de mi.

Bonŝance, la partoprenantoj ne nur babilumis pri kiel helpi, sed vere helpis mem. Ni sendis al kelkaj lokaj grupoj eksterlandaj pakajetojn da gazetoj kiel malgrandajn donacojn, kaj eĉ subskribis aliajn leterojn por danki kaj saluti personojn. La tutan semajnfinojn ĉiuj tre volonte kaj ĝentile helpis alian partoprenanton, iom pli aĝan kaj tute blindan. Ŝi poste diris al mi, ke ŝi miris, ke ŝi eĉ ne bezonis peti helpon de iu, ĉar ĉiuj jam proponis helpon.

Kvankam la programo ĉe la monaĥinejo finis je la 10a atm dimanĉon, la amuzo fakte daŭris dum mi helpis la partoprenantojn atingi la bushaltejon kaj stacidomon en Filadelfio. Post vigla kaj laŭta tagmanĝo (en unu flanko de la tablo okazis tre verva diskuto pri kapitalismo, en alia la estrarkunveno de USEJ), ni piedmarŝis longtempe (ja kelkajn horojn, por ekzerci post tiom da manĝado) tra la bela urbejo, dum kiam ni faris multe da unikaj fotoj, vidis historie gravajn lokojn de Usono, kaj eĉ iom surdiĝis (pro la eksplodantaj piroteknikaĵoj dum la azia novjara ceremonio de la draĝa danco, kiun ni bonsance ektrovis hazarde en la ĉina kvartalo).

Do, ek suden, junuloj, al Washington DC, kie plej verŝajne la venonta JES okazos... faru planojn por kunfesti la 5an datrevenon de USEJ tie! Se pro iu stranga kialo vi maltrafos la okazon, certe vojaĝu tien en la jaro 2000, kie (espereble) okazos la 56a Internacia Junulara Kongreso!

ktp! / saluton!

januaro/aprilo 1996

# La Monaĥaj kaj Laikaj Komunumoj de Jerusalemo

La misio de la Monaĥaj Komunumoj de Jerusalemo, kiujn fondis en Pariza preĝejo Sankta Gervazo en la Festo de Ĉiuj Sanktuloj 1975 Patro Pierre-Marie Delfieŭ kunlabore kun Kardinalo François Marty, estas vivi en la koro de la urbo, en la koro de Dio.

La kernon de ilia vokiĝo kaj la bazon de ilia vivo resumas la preĝo de Jesuo: 'Patro, mi petas, ne ke vi forigu ilin el la mondo, sed ke vi gardu ilin kontraŭ la malbono.' (Johano 17:15). Ĉar homoj estas kreitaj kiel la plej bela figuro kaj similaĵo al Dio, la gemonaĥoj de Jerusalemo volas preĝi kaj renkonti Dion en la urbego, inter ties loĝantoj. Per vivo de komunumeco kaj kontemplado, kiu malkaŝas la ĉeeston de Dio en la koro de tiu ĉi mondo, ili volas servi kaj etendi la brakon al ĉiuj, kiuj serĉas Dion.

Tiel, la gemonaĥoj de Jerusalemo strebas meti preĝadon en la urbon kaj porti la urbon en siaj preĝoj. Ili deziras krei oazon en ĉi tiu urba 'dezerto' de izolo kaj maltrankvilo, sopiro aŭ indiferenteco per vivigo de silenta preĝa loko, kiu estas ankaŭ loko de bonveno kaj komuno.

Ilia monaĥa vokiĝo havas kvin distingajn trajtojn:

Unue kaj ĉefe ili estas urboloĝantoj, ĉar la urbigo estas sendube unu el la plej gravaj disvolviĝoj de la moderna epoko, kaj la rapida kresko de grandaj urbegoj fariĝis universala fenomeno.

Ili luas siajn loĝejojn, kiel faras plejmultaj hodiaŭ, por eviti la riskon tro hejmiĝi kaj amasigi domaron.

Ili perlaboras salajron, sed laboras nur parttempe, vivtenante sin en maniero, kiu esprimas solidarecon kaj defion al la laborejo, kaj kiu gardas ilin de la deziro sukcesi en nivelo ekonomia aŭ socia.

Ili estas rekta parto de la dioceza eklezio, laŭ la spirito de Vatikano II, por plene vivi en la realo de la loka eklezio kaj por pli bone adaptiĝi al malsamaj situacioj kaj kulturoj.

Fine, ili havas nenian internan klostron, sed rezervas lokojn kaj horojn de silento tiel, ke estu klare, ke ili vivas 'disĉe' sed ankaŭ en spirito de komuna sento.

La Gefratoj de Jerusalemo preĝas ĉiutagan liturgion en la koro de urbo, en la preĝejo al si konfidita, sciante, ke 'Se la Eternulo ne gardas urbon, tiam vane maldormas la gardanto.' (Psalmaro 126:1). Ĉirkaŭpreninte la ritmojn de la urbego, ili preĝas matene, tagmeze kaj vespere: Matena Preĝado tuj antaŭ la komenco de la labortago; Tagmeza Preĝado en la lunĉoro; Vespera Preĝado kaj Eŭkaristio kun tiuj, kiuj revenas hejmen de la laborejo.

Ilia liturgio, kantata entute en kvar voĉoj, estas tiu de la romkatolika rito, sed ĉerpas de tradicioj de orienta kaj okcidenta kristanismo, malfermita al la spirito de eklezia renovigo kaj al la voko de ekumenismo. 'Se vi

volas scii, kion ni kredas, venu aŭdi, kion ni kantas,' diris Sankta Aŭgusteno. Kvankam la monaĥoj kaj monaĥinoj kuncelebras la liturgion, ili formas du apartajn komunumojn, sendependajn je loĝado, financo kaj regado.

La Regulo de Vivo, kiu estas ilia komuna rilato kaj ilia spirita gvidanto, esprimas la kernon de ilia monaĥa vivo kaj la distingajn trajtojn de ilia propra vokiĝo. Ĝi vokas ilin al amo, preĝo, laboro, gastamo kaj silento; ĝi vokas ilin esti ĉastaj, malriĉaj, obeemaj, humilaj kaj ĝojaj, ĉiom dum vivo en la koro de la mondo, en la koro de la urbego, en la eklezio, kaj kiel gefiloj de Jerusalemo.

Kiel urbaj gemonaĥoj, ili havas la nomon 'Jerusalemo', ĉar Jerusalemo estas la patrono de ĉiu urbo. Tie Kristo vivis, mortis kaj revenis al nova vivo. La Eklezio fondiĝis tie; la unuaj kristanaj komunumoj naskiĝis tie. Ĝi estas sankta urbo por judoj, kristanoj kaj islamanoj egale. Ĝi estas ankaŭ la simbolo de nia espero je ĉielo, nia fina sorto.



Post rekono en 1979 de Kardinalo Marty kiel 'Asocioj de la Fidelaj', en 1991 Kardinalo Jean-Marie Lustiger establis la Jerusalemajn Komunumojn kiel religiajn institutojn de monaĥa karaktero. La du institutoj de viroj kaj virinoj havas similajn statutojn, sed ĉiun regas sendepende ĝia propra ĉefprioro aŭ ĉefpriorino. Ĝis nun, estas cent gemonaj de dudeko da malsamaj naciecoj. La Monaĥaj Komunumoj de gefratoj establita en diversaj urbegoj kune formas la Komunon de Jerusalemo.

Apud la Monaĥaj Komunumoj, ankaŭ la Laikaj Komunumoj de Jerusalemo estiĝis, en deziro vivi en tiu sama spiriteco ene de siaj malsamaj vivelektoj. Tiuj ĉi laikaj grupoj kunigas homojn de similaj aĝo aŭ interesoj: estas grupoj por junaj gefraŭloj, junaj paroj, infanoj, adoleskantoj, kaj tiuj, kiuj serĉas sian profesion. Estas ankaŭ 'la Infanoj de Abrahamo', malfermaj al interreligia dialogo, 'Ogivoj Sankta Gervazo', kun fokuso pri arto kaj kredo, 'Efata', kiu propetemas por la malsanaj, k.t.p. Ĉiuj ĉi diversaj komunumoj kune formas la Familion de Jerusalemo.

## Lernu pli ol mil vortojn en malpli ol unu minuto!

Ni konstatis dum diversaj renkontiĝoj de skoltoj en Eŭropo, ke la junuloj kutime nenion scias pri Skolta Esperanto-Ligo. Multaj eĉ ne scias, ke Esperanto estas lingvo!


Granda problemo estas interesi ilin, por ke ili haltu por kelkaj minutoj, sufiĉe longe, por ke ili aŭskultu al nia klarigado.

Ni faris provon dum du renkontiĝoj en septembro 1994.

Ni preparis per fotokopio paper-etojn (1/4 de A4) kaj faldis ilin en la mezo. Ni pendigis kelkajn grandajn afiŝojn (1 × 1.5m) sur la muroj kun la teksto "Lernu pli ol 1000 Esperanto-vortojn en malpli ol 1 minuto!"

La junuloj aspektis mirante, kiam ili legis nian reklamon. Ni demandis ilin, ĉu ili kapablas tion. Ili nekredeble ridetis. Ni disdonis la preparitajn paperetojn kaj montris, kiel oni formas la nombrojn en Esperanto, t.e. eĉ pli ol 1000 vortoj! Al kelkaj ni petis ekzemple: Legu 32 391! Al alia ekzemple: Legu 93 316 282! Ili kapablis tion per helpo de la papereto. Por honorigi ilin ni turnis la papereton kaj pendigis ĝin al la butono de la ĉemizo, simile al medalo.

Ili tre entuziasmiĝis. Eble ankoraŭ restas duona minuto por lerni la konjugaciojn! Poste kelkaj ridete petis, ĉu ili rajtas je dua medalo!



Pere de la didakta panelo Esperanto-elekto ni povis facile klarigi Esperanton al la mirigitaj, scivolemaj junuloj. Esperanto-elekto havas pli grandigitajn ekzemplojn de la SEL-lernolibro Jamborea Lingvo. (Ni uzis ĝin sukcese ankaŭ en la Eŭropa Jamboreo). Kelkaj trarigardis poste la librojn, broŝurojn kaj aliajn aĵojn sur nia informtabulo. *Pasporta Servo* estis speciale interesa.

Grava trajto de tiu ĉi informmaniero estas, ke la skoltoj mem faras tuj rimarkeblan propagandon por SEL kaj Esperanto. Ili povas mem ekinstrui al aliaj la nombrojn. En la kapo restas memoro pri Esperanto: agrabla, logika lingvo. Ili povas meti la papereton en libron. Sur ĝi troviĝas ankaŭ utilaj informoj, ekzemple telefonnumeroj.

Nia provo bone sukcesis! Ankaŭ la estroj akceptis niajn medalojn. Eble ankaŭ vi povos uzi la ideon! Ni deziras al vi sukceson!

Arie BOUMAN,

Skolta Esperanto-Ligo, Belgio

# Niĝerio – survoje al ebla disfalo

Kiel la tuta mondo sciigis, 1993 estis la plej malbona ekonomie, religie kaj ĉefe politike en la historio de Niĝerio ekde sendependiĝo en 1960 de Britujo.

Unue ekestis diversaj religiaj konfliktoj en norda Niĝerio, ĉefe en ŝtatoj Bauchi, Katshina, Kaduna kaj Sokoto, en kiuj islamaj fundamentalistoj mortigis nekona-tajn nombrojn da “fremduloj” – temis pri kristanoj el la suda parto de Niĝerio, precipe Ibo-anoj. La diktatora reĝimo de eksprezidento Generalo Ibrahim BABANGIDA ku-raĝigis etnajn sentojn kaj konfliktojn, kiuj kreis malfidon kaj konfuzon inter la diversaj gentoj kaj cetere fortigis la diktatorecon de BABANGIDA. La gentoj sekve batalis inter si por rego de la ekonomia kaj politika me-kanismoj de la lando.

Ankaŭ en 1993 Niĝerio frapis je la pordo de interna milito. Miloj da civitanoj perdis sian vivon en protestoj, strikoj, k.t.p., kaŭzitaj de BABANGIDA. Okazis voĉdono por elekti civitan prezidenton je la 12a de junio 1993, post ok jaroj de diable koruptita diktatora reĝimo de Generalo BABANGIDA, kiu ne malkontentigis liajn kriti-kantojn (kiuj kromnomis lin “Niĝeria Maradono”). Post nuligo de multaj voĉdonoj kaj mensogoj, kiuj karakteri-zis lian reĝimon, je la 12a de junio okazis voĉdono juĝi-ta de niĝerianoj kaj internaciaj observantoj la plej bona en la historio de Niĝeria politiko.

La voĉdonon partoprenis du kandidatoj de la du par-tioj – N.R.C. kaj S.D.P. La kandidato de S.D.P. – sociala demokratia partio --, populare konata en Niĝerio kiel “la savanto de la popolo”, nome Basherun ABIOLA, tre konvinke venkis nekonsiderante la etnajn kaj religiajn barojn, kiujn li renkontis. Antaŭ ol la popolanoj ekspiras venton de libereco el armea diktatoreco, Niĝeria Mara-dono pruvis sian kromnomon. Li nuligis la tutan voĉdo-non, por ke li realigu sonĝon fariĝi dumviva prezidento, eble kiel Mobutu Sese SOKOU de Zairo aŭ EYADAM de Togo.

Niĝerianoj rifuzis akcepti tiun agon. Dum monatoj la civitanoj marŝis al la stratoj protestante. Estis protestoj, strikoj, civita malobeo ĉie en la lando. BABANGIDA pravis, ke oni ne defios lin. Ankaŭ policistoj, soldatoj kaj aliaj membroj de sekreta armeo fondita por protekti lin marŝis al la stratoj detruante la homojn, kiuj protestis por siaj rajtoj; miloj pagis per sia vivo. La “knaboj de IBB”, kiel oni nomis la armeon, mortigis ĉiujn, kiuj ren-kontis lin. Fakte okazis alia etna purigado kiel tiu en

eksa Jugoslavio. Niĝerianoj, timantaj pri ebla interna milito, memvole revenadis amase al siaj hejmlokoj, ŝta-toj, urboj, vilaĝoj, k.t.p. Multaj homoj denove perdis la vivon, kaj aliaj perdis la fruktojn de multjaraj laboradoj survoje pro ŝtelistoj aŭ akcidentoj.

La internacia komunumo kondamnis la reĝimon, sed tio ne malkuraĝigis BABANGIDA, kiu respondis per pro-pagandadoj; sed la voĉo de senesperaj, malriĉaj, lacaj niĝerianoj fariĝis tre forta por BABANGIDA. Plore kaj he-zite je la 26a de aŭgusto 1993 la aĉulo forkuris, sed an-taŭ tiam la diablo mem manprenis siajn disĉiplojn kaj formis neleĝan registaron sub gvido de Ernest SHONE-KAN – konfuziĝa, timema kaj malkuraĝa komercisto de ŝtato Ogun (de kie ABIOLA devenas).

Dum 82 tagoj, la reĝimo de SHONEKAN vane serĉis leĝigon por sia registaro. En daŭrigo de la “paciga poli-tiko” de BABANGIDA (temis pri metodo, per kiu kriti-kantoj de la registaro estas pacigitaj per disdonado de monoj, bonaj postenoj, k.t.p.), SHONEKAN kaj lia teamo tielmaniere “ĝustigis” multajn kritikantojn kaj eĉ forti-gis la propagandilojn komencitajn de BABANGIDA.

Tio fariĝis miraĝo, ĉar je la 17a de novembro iu mem-bro de la neleĝa reĝimo kaj ĉefsubulo de BABANGIDA kaj SHONEKAN – Generalo Sani ABACHA – ŝokis la lan-don, kiam li anoncis sukcesan ŝtatrenverson, per kiu li transprenis la registaron ĉefe por plenumi dumvivan sonĝon fariĝi prezidento. Do SHONEKAN kaj lia teamo forbloviĝis. Ironie la sama Sani ABACHA, kiu dum ok jaroj manĝis kun Babangida, nun promesis al niĝerianoj ĉiel-on kaj teron. Li promesis inter aliaj aferoj Nacian Stat-utan Konferencon, por ke li havu tempon fortigi sin kaj teni la registaron ĝis la jaro 2000 aŭ pli.

Niĝerianoj jam scias, ke la “moka konferenco”, kies decidoj estos subfina aprobo de la Provizora Reganta Konsilio” (P.R.C.) gvidata de ABACHA nepre malsukce-sos. Nekonsiderante tiun fakton, la tri ĉefaj gentoj Ibo, Haŭso kaj Jorubo nun ekpreparas sin por ebla disfalo kaj divido de Niĝerio laŭ etna linio kaj debatas kaj lo-bias ĉefe la minoritatojn por formi aliancojn. Estas be-daŭrinde, ke la samaj politikistoj, kiuj kunlaboris kun la armeo de BABANGIDA kaj ABACHA por persona profito kaj materialaj kaj financaj donacegoj, estas tiuj, en kies manoj la estontoj de Niĝerio (pli ol 100 000 000 enloĝan-toj) metiĝos.

La situacio nun fariĝis tiom akra kaj danĝera. La venkinto de la junia voĉdono deklaris sin prezidanto kun la aprobo de la homrajtaj grupoj kaj demokratiaj organizaĵoj, kiuj nun formis aliancon kun la nomo NA-DECO (Nacia Demokratia Koalicio).

ABACHA arestis ABIOLA kaj denove la du kampoj el-preparas por la fina batalo, en kiu kuŝos la estontec de la civitanoj. Je la 27a de junio, ABACHA inaŭguris nacion konferencon en defio al oponaj grupoj, kiuj jam anoncis datojn por tutlandaj protestoj, strikoj, konfliktoj, k.t.p.

La tuta mondo ĝis nun rigardis farante nenion, dum Niĝerio daŭre marŝas al disfalo kaj ebla interna milito. Kvankam jam estas sankcioj, celitaj al la armeo de Usono, Kanado, Britio kaj membroj de la Eŭropa Komunumo, tio tamen estas nenio. La tuta mondo nepre senprokraste protestu kontraŭ la arma diktatoreco kaj la subpremo de demokratiaj Niĝerianoj, antaŭ ol ĉio fariĝos tro malfrua. Sen tio, mi timas por mia lando kaj por la kompatindaj senhelpaj civitanoj.

artikolo de Princo-Henriko OGUINYE,  
prezidanto de Niĝeria Junulara Esperantista Klubo

---

---

## La du meksikiaj fratinoj

La plano estis preta. Baldaŭ, Maria kaj ŝia ĝemela fratino, Liza (kiu povus agi kiel spegulo por la alia) estos fuĝintaj. Libereco atendanta vokis ilin. Pli bone, la bebo enutera de Maria estos libera.

‘Ho, mia ventro — ĝi grasas,’ diris Maria, montrante ĝin.

‘Vi estas maldika rizero. Vi aspektas bele!’ respondis Liza.

‘Ne gravas, ĉar baldaŭ mia bebo estos libera!’

‘Kaj, ne forgesu, ankaŭ ni!’ Ili ambaŭ ridetis ege. La suno estis falanta kaj la oranĝa lumo dancis sur la okuloj de Maria. La vento kisis la longajn nigrajn harojn de Liza.

‘Morgaŭ, kiam la suno estos supra, ni estos en Usono. Mia bebo estos naskiĝinta kaj fariĝos usonano laŭleĝa. Estos facile kaj simple,’ Maria flustretis.

‘Bonan nokton, Maria.’

‘Bonan nokton, Liza.’

La ĉielo mallumiĝis kaj la du ĝemelaj fratinoj dormis.

La sekvan tagon, ili ege silente piediris sur la tervojo. La suno estis leviĝonta post duona horo. La fratinoj sidis apud monteto kaj rigardadis la ĉirkaŭbaron sur la usona landlimo, cent metrojn malproksima. Dum la nokto, ĝuste laŭ la plano, vira amiko tranĉis la baron. La birdoj ekkantis dum la ĉielo ekflaviĝis.

Je la kutima horo, la usona policaŭto pasis. La fratinoj ridetis kaj rigardis unu la alian.

ktp! / saluton!

‘Ni iru!’ diris Maria.

‘Libereco, jen ni venas!’ diris Liza.

Iliaj piedoj portis sin rapide al la baro. Liza puŝis Marian supren al la mursupron. Maria metis la dekstran kruron trans la muron. Ŝi, nun en ambaŭ flankoj de la muro, rigardis sian fratinnon. Ŝi frapetis la enuteran bebon.

‘Liza, mi kaj Bebo estas duone usonaj!’ Dum Liza estis superiranta, Maria mensridis kaj turnis sian kapon. Ŝiaj okuloj estis salutataj de la okuloj de usona policano. Ŝia dorso tremetis kaj ŝia utero tremegis.

‘Po—policano! Mia bebo! Aaaaah!’ La terura krio timigis Lizan.

‘Policano?! Malsupreniru nune!’ La policano ekprenis la dekstran kruron de Maria kaj Liza ekprenis la maldekstran kruron. Ĉi tiuj ekprenadoj komencis la naskon. Eksplozo inter la kruroj pafis ne unu, sed du bebojn! Du ĝemelaj beboj falis, unu malsupren apud la usona flanko de la muro, kaj la alia malsupren apud la meksikia flanko de la muro. Ambaŭ falis sur la brunan grundon dum la bebaj voĉoj bruis laŭte je la sama tempo.

La unua bebo fariĝis tiel usona civitano, kaj Maria patrinis ŝin. La alia fariĝis meksikia civitano, kaj Liza patrinis ŝin.

❧ FINO ❧

Rakonto de Brian Wight  
(Berkeley, Kalifornio, Usono)

# Citaĵoj de belgaj eŭroparlamentanoj pri Esperanto

‘Eblas, ke iam Esperanto iĝos la lingvo, kiu *solvus la lingvan problemon* de la komunikado. Bedaŭrinde, la eŭrokratoj ne serioze pristudas tiun solvon.’

Anne ANDRÉ-LÉONARD

‘Do, post longa tempo, la Unio devos eble (aŭ verŝajne) pensi pri supernacia lingvo, kiel Esperanto, por la komunumaj instancoj. Ĝis tiam, *mi rifuzas limigitan nombron da lingvoj.*’

Marie-Paule KESTELIJN-SIERENS

‘Nun, kun 15 ŝtatemprooj, *la tradukado englutas trionon* de la eŭroparlamenta buĝeto. Tamen, post longa tempo, oni eble devos pensi pri la uzado de unu supernacia lingvo, kiel Esperanto.’

Willy DE CLERQ

‘Kun la programita aniĝo de 25 membroj-ŝtatoj, la lingvoproblemo iĝos *vere nesolvebla kaprompaĵo*. Tial, la ŝancoj de Esperanto pliboniĝas, samtempe kiel la pligrandiĝo de niaj malfacilaĵoj.’

Fernand HERMAN

‘Eĉ se la prudento rekomendas al mi skeptikismon, *mi atentegas la eblecojn* de la disvolviĝo de Esperanto. Mi estas je via dispono por ĉiu utila interveno.’

Claude DESAMA

‘Iom post iom, la lingva problemo en Eŭropa Unio estigas pli kaj pli da problemoj. Tamen ni ne deziras, ke ia “praktika farebleco” iĝu argumento por forigi la statuson de malgrandaj lingvoj. Malgraŭ tio ni ne restu blindaj pri la kreskantaj malfacilaĵoj en la Eŭropaj instancoj. Efektive, el tiu vidpunkto kaj post longa tempo, *ni eble devos pensi pri supernacia lingvo* kiel Esperanto.’

Frederik WILLOCKX

‘Esperanto devus esti efika komunikilo inter la popoloj de l’ onta Eŭropo. Ĉiukampe neŭtrala, logika kaj praktika lingvo iĝus *grava atuto por Eŭropo*. Tamen endus, ke ĝia lernado estu adoptita ekde la komenco de la elementa lernejo. Opiniante, ke Esperanto estas la solvo de la problemoj, kiujn ni frontas, *mi tute subtenos vin por defendi ĝin.*’

José HAPPART

‘En Eŭropa Unio, kaj precipe en la Eŭropa Parlamento, la ĉeesto de tiom da lingvoj *estigas regule praktikajn problemojn*. Tamen tiuj ĉi ne povas esti kialoj por limigi la uzadon de “malgrandaj” lingvoj. Tio ne signifas, ke Esperanto, kiel supernacia lingvo sufiĉe “neŭtrala”, ne povas pruvi sian utilon en pluraj kampoj de la eŭropa komunuma vivo. Laŭ tiu vidpunkto, apogo al plua disvolviĝo de Esperanto *estas interesa kaj utila projekto.*’

Magda AELVOET

‘Rilate al la uzo de Esperanto en internaciaj instancoj, mi opinias, ke gravegas obstine defendi, kiel demokratarajto, *la uzadon de propra lingvo* sine de la Eŭropa Parlamento. Kiel ajn mi pensas, ke — iam necesos trovi praktikan solvon pri la lingva problemo en eŭropaj instancoj — *Esperanto estus taŭga rimedo*. Tamen, laŭ mi, Esperanto devas eniri la normalan vivon de ĉiuj. Por tio lernejoj devus aparte fari sian eblon.’

Anne VAN LANCKER

“ ”

• • •

Kompilitaj, kun permeso de la aŭtoroj, de  
Germain PIRLOT [Kursivoj de la redaktoro]

# 'S up? La junula lingvo de Usono kaj Britio

Kiel en ĉiuj landoj, la junuloj de Britio kaj Usono havas apartan, unikan lingvon de si mem, influitan de muziko, filmoj, televidaj programoj kaj aliaj fontoj. En aparte granda lando kiel Usono, vorto uzata en la orienta flanko de la lando estas preskaŭ nekomprenebla en la alia!

## Jen kelkaj ekzemploj el Usono

- **'s up?** Mallongigo de *What's up* (kiu jam enhavas mallongigon), kiu signifas 'kiel vi fartas?'
- **cool.** Uzata jam delonge, ĝi priskribas ion aparte laŭmodan.
- **dude.** Ankaŭ uzata jam delonge, sed ne tiom nun, ĝi similas al 'ulo'.
- **phat.** Vorto por priskribi ion tre bonegan aŭ laŭmodan.
- **sweet.** Interjekcio, kion oni uzas, eksciante pri feliĉaj novaĵoj.
- **tool.** Uzata en kelkaj universitatoj por nomi iun stulta aŭ neinteligenta.
- **PC** (mallongigo de *politically correct*, 'politike ĝusta')  
Esti politike ĝusta estas aparte grava koncepto nuntempe, ĉar oni ne rajtas iel ofendi al personoj; do oni devas ĉiam singardi kontraŭ seksismaj, diskriminaciaj, rasismaj, kaj aliajn tiajn vortojn.

Ekzemple, vorto por nova studento ĉe la unua jaro de la universitato estis *freshman* (laŭvorte 'freŝa viro'). Sed, ĉar tiu vorto estas seksisma (ĝi enhavas *man*, 'viro'), la esprimo nun uzata estas 'unuajara studento'.

Pli facila ekzemplo estas la nuna uzo de *African-Americans* ('afrikanoj-usonanoj') anstataŭ *blacks* ('nigruloj').

Sed kelkaj ja pensas plurajn el la novaj vortoj ridindaj. Ekzemple, oni konsilas uzi nun la vortojn *vertically challenged* ('vertikale handikapita') anstataŭ diri *short* 'malalta'.

## Kaj jen kelkaj ekzemploj el Britio:

- **top** Uzata adjektive por nomi ion tre bone farita; ekzemple, eblas diri *top answer*, kiam iu taŭge rebatas sarkasman komenton.
- **jammy** ('konfitureca!'). Bonŝanca.
- **dosh.** Slanga vorto por mono.
- **sprog.** Uzata substantive kun la signifo 'bebo' aŭ 'infaneto', kaj ankaŭ adverbe kun la senco 'naski'.
- **knackered** ('buĉita'). Ofta sinpriskribo de treege laca persono.
- **knock up.** Inter la signifoj de ĉi tiu esprimo troviĝas 'ellitigi je neatendita horo': se iu telefonas al vi de Aŭstralio, forgesante, ke estas la tria matene ĉe vi, vi rajtas plendi, ke tiu *knocked you up*.
- **chuffed.** Tre kontenta pri ia sukceso, ofte uzata en la esprimo *well chuffed*. (*Well*, 'bone', aperas kiel emfazilo en multaj britaj slangaĵoj, ekzemple la jam eksmodiĝanta *well wicked*, kiu fakte signifas 'ege bone'!)
- **sad** (malĝoja). En konversacio tiu vorto ricevas la utilan kromsignifon 'senutilaĉa' (ekzemple pli profesio).
- **naff.** Adjektivo similsenca kun *sad*, sed povas uziĝi ankaŭ verbe plus *off* por forigi iun: *Naff off!*

# Kantaĵoj el la angla:

## *Ambaŭflanke (Both Sides Now)* de Joni Mitchell

Anĝelhara silkriver'  
Glaciaĵkasteloj en l' aer'  
Kaj plumkanjona stratosfer';  
Jen nuboj en memor'.  
Sed nun, nur kontraŭsuna bar'.  
Al cxiuj pluvoportantar',  
Jam brilus mi, ja sen kompar'  
Se nuboj estus for.  
Jes, ambaŭflanke vidis mi  
Ŝanĝiĝojn de l' situaci';  
Sin trudas, tamen, iluzi'  
Kaj restas nuboj ekster sci'.  
Lunluma, amuzeja tent',  
Danciga, eĉ vertiĝa sent'  
Pro elfabela korkontent';  
Jen amo en memor'.  
Sed nun, pajaco sur scenej'  
Postlasu ridojn, ŝercu tre  
Kaj tiam, kiam gravas plej,  
Kaŝita restu kor'.  
Jes, ambaŭflanke vidis mi  
Ŝanĝiĝojn de l' situaci';  
Sin trudas, tamen, iluzi'  
Kaj restas amo ekster sci'.  
Larmoj kaj fiera tim'  
Pri diri, 'Jes, mi amas vin.'  
Revoj, streboj, cirkfascin';  
Jen vivo en memor'.  
Sed nun kapskuas amikar'  
Pro ŝanĝoj je la repertuar';  
Nu, perdi, gajni: jen la far'  
De ĉies vivesplor'.  
Jes, ambaŭflanke vidis mi  
Ŝanĝiĝojn de l' situaci'  
Sin trudas, tamen, iluzi'  
Kaj restas vivo ekster sci'.

Bows and flows of angel hair  
And ice cream castles in the air  
And feather canyons everywhere,  
I've looked at cloud that way.  
But now they only block the sun,  
They rain and snow on everyone.  
So many things I would have done  
But clouds got in my way.  
I've looked at clouds from both sides now,  
From up and down, and still somehow  
It's cloud illusions I recall.  
I really don't know clouds at all.  
Moons and Junes and ferris wheels,  
The dizzy dancing way you feel  
As every fairy tale comes real;  
I've looked at love that way.  
But now it's just another show,  
You leave 'em laughing when you go  
And if you care, don't let them know,  
Don't give yourself away.  
I've looked at love from both sides now,  
From give and take, and still somehow  
It's love's illusions I recall.  
I really don't know love at all.  
Tears and fears and feeling proud  
To say 'I love you' right out loud,  
Dreams and schemes and circus crowds,  
I've looked at life that way.  
But now old friends are acting strange,  
They shake their heads, they say I've changed;  
Something's lost but something's gained  
In living every day.  
I've looked at life from both sides now,  
From win and lose, and still somehow  
It's life's illusions I recall.  
I really don't know life at all.

Tradukis Krys UNGAR